

FELIĈAN KAJ PROSPERPLENAN NOVJARON AL ĈIUJ NIAJ MEMBROJ,
AMIKOJ ENLANDAJ KAJ EKSTERLANDAJ!

PACO KAJ SUKCESOJ AKOMPANU NIAN MOVADON ĈIE!

KLUBO ESPERANTISTA EN PRAHA.

N I A J A R O S L A V Ŝ U S T R 25 J A R O J N P R E Z I D A S L A K L U B O N !

Certe unu el la plej konataj nomoj en Esperantujo estas tiu de UEA-delegito, longjara ĉefdelegito Jaroslav Ŝustr el Praha. Estas li, kiu en pli frej tempoj estis motoro de tiel vigla movado en nia ĉefurbo kaj estas li, kiu ankaŭ dum la tempo pli posta montris sian grandan energion, kiam aliaj timis ion ajn fari por la movado. Dum la ŝtata mallibero li gardis tutan Kocian havaĵon, la plej grandan mezeŭropan Esperanto-bibliotekon de nia Klubo kaj ne unufoje li havis gestapon en sia hejmo. Animo de grupo de esperantistaj fideluloj li restis dum la tuta milito. Kaj post tiuj kruelaj jaroj kun nova energio, ĉiam ridema kaj bonhumora, afabla kaj bonkora li denove staras kiel la unua de la Klubo. Denove al eksterlandaj gastoj, karavanoj li kun helpo de ceteraj klubanoj montras la konatan ĉeĥoslovakon gastamon, plenumas siajn taskojn de la delegito, prelegas, informas, vizitas landajn kongresojn, konferencojn aŭ najbarajn esperantistojn, zorgas pri: aferoj, kiujn ne povas plenumi neekzistanta Asocio.

Ankaŭ por sia familio li havas sian tempon, kvankam lia okupo estas nervostreĉa kaj temporaba. Ankaŭ en tiu rilato li estu ekzemplo por ni!

Por la movado depost sia junaĝo li dediĉas ĉiujn siajn eblecojn kaj tempon kaj dum jardekoj en la Klubo nur tre malmultajn vesperojn lia loko ne estis okupita. Ni, kiuj konas lin, kiuj scias pri lia laboremo, ni nur povas admiri liajn energion, viglon kaj sindonon al nia afero. Vere, ekzemplo ne imitinda!

La 23-an de januaro 1956 li festas raran jubieon, kiun nur malmultaj povas festi. Al tiu ĉi jubileo ni esprimas sincerajn vortojn: Li restu longe sana por sia familio kaj ankaŭ por ni ĉiuj, li gvidu nin ankaŭ dum longaj jaroj nun, kiam la suno de proksimiĝanta favoro komencas efendi siajn unuajn varmigajn radiojn!

... Jak nin ne timigas la netaj fantomoj,
nek batoj de l' sorto, ne moko de l' homoj,
ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita ĝi estas,
la voj' elektita...

Praha-ek-1956-33-02

BULTENO PRAHA 33 - 1956

- 02-

ESPERANTISTA KLUBO en Praha kunvenas ĉiumerkrede en Praha II., Ve Smečkách 26 je la 20-a horo.

Programo por la I-a kvaronjaro 1956:

JANUARO:

4.1. Novjaraj planoj kaj perspektivoj – libera tribuno de la membraro.

11.1. E. V. TVAROŽEK /TURČ.MARTIN/: Iama kaj nuna bildo de la movado en Slovakio.

18.1. JAROSLAV ŠUSTR: Rememoroj el mia 25-jara kluba prezidanteco.

25.1. JOSEF KOŽENÝ /KUTNÁ HORA/: Per raketoplano al novaj mondoj.

FEBRUARO:

1.2. ILJA SEKERA: Interesaĵoj pri numeroj.

8.2. Dr-ino MAGDA SEPPOVÁ-ŠATUROVÁ /BRATISLAVA/: Temo anoncota en februaro.

15.2. Geedzoj INGE & DOLFA BARTOŠÍK: Memorfolioj el la lando de Shakespearo.

22.2. JIŘÍ KOŘÍNEK /BRNO/: Rimskij Kousakov /kun gramofondiskoj.

29.2. VLASTIMIL NOVOBILSKÝ: Vizito ĉe niaj majstruj.

MARTO:

7.3. FRANTIŠEK OMEJKA /OTROKOVICE/: „Unua vojaĝo ĉirkaŭ la mondon“ /historia romano, kiun mi verkas/
a/ kiel mi havigis al mi historian materialon,
b/enhavo de la libro.

14.3. Dro TOMÁŠ PUMPR. Kiel ni traduku tangon. Kun akompano de sam. Šmejkal /gitaro/ kaj ceteraj membroj de la junularo.

21.3. JOSEF VONDROUŠEK /BRNO/: Ekspedicio en steloj notita /Jason al Kolhido/.

28.3. JIŘÍ PASTOR: Novaĵoj de elektroteknika industrio.

APRILIO:

4.4. MILOŠ LUKÁŠ: /HRADEC KRÁLOVÉ/: Kiel helpis min Esperanto dum mia preskaŭ duoncentjara praktikado de ĝi

11.4. ARTVESPERO DE VERDA ĈARO DE JULIO BAGHY HONORE AL LA MAJSTRO.

18.4. D-ro JAROMÍR JERMÁŘ: Hodiaŭa situacio de neesperantistaj lingvaj projektoj kaj nia rilato al ili.

25.4. MILOŠ RUDOLF /OLOMOUC/: Ekspedicio Kon-Tiki.

EKSTERPRAHANOJ ATENTU! Ni ricevis sufiĉe multajn informojn de niaj gesamideanoj, ke merkrede por la artvespero de nia Verda Ĉaro de Julio Baghy estas por ili malkonvena. Tial ni intencas aranĝi novan artvesperon kun ŝanĝita decembra programo iun sabaton versimile fine de februaro/, se ni sukcesos akiri taŭgan salonon kun scenego. Precizajn informojn ni publikigos en nia februara numero.

KLUBO ESPERANTISTA EN PRAHA dankas al la partoprenintoj de nia arta vespero honore al la Majstro, ke ili vere imponnombro reprezentis la esperantistaron en Praha. Arto, kiun prezentis a lili anoj de la Verda Ĉaro, certe estis por ili bona rekompenco.

--

NIAJ MEMBROJ.

POSTJUBILEA REMEMORO: En novembro 1955 atingis 70 jarojn de sia vivo Frant. S k ř i v á n e k, financ ĉefkonsilanto e.p., longjara esperantisto kaj membro de nia klubo. Li esperantiĝis en jaro 1910 en sia naskiĝurbo Čáslav, poste li delegiĝis en Kutná Hora, aktivis en České Budějovice. En Praha li estis dirigenta vizitanto de niaj klubaj kunvenoj. Nun li vivas en Karlovy Vary, kie li aplikas siajn spertojn. Al nia ŝatata membro-jubilanto ni deziras ĉion plej bonan en la estonteco kaj „Bonan venton“, ĉar li estas ankaŭ vigla turisto.

-

ESPERANTISTO-AKADEMIANO. Samideano Theodor J e ŝ d í k, profesoro de Alta teknika lernejo en Praha /fako: konstruo de akvorezervujoj/, estas membro de Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj kaj estro de ĝia teknika sekcio. Esperantistoj ĝojas havante amikon en tiu plej alta science institucio ĉeĥoslovaka.

-

Kurso finita. Ekzamenon trapasis 22 gekursanoj. Gvidis A. D. Kremer. Fondita E-rondet, kunvenoj ĉiuĵaŭde /19-a horo/ en la industria lernejo, kie perfektiga instruado. Koran gratulon kaj dankon al ĉiam vigla kara s-ano Kremer!

Praha-ek-1956-33-04

BULTENO PRAHA 33 - 1956

- 04-

LÁZNĚ JESENÍK:

Formiĝis Esp.rondeto kaj ni salutas ĝiajn 25 membrojn. La rondeton kaj novan kurson gvidas Ladislav Pečínka.

MIKULOV:

Esperantista klubo de pacdefendantoj larĝe kunlaboras kun la distrikta paca komitato, en kies salono ĝi dufoje monate havas siajn laborkunvenojn. Por la jaro 1956 estas kluba plano: studado de Esperanto, distribuo de esp.gazetaro, kolekti historian kronikon de esp.movado en Lednice, Břeclav kaj Znojmo. Gvidas kapitulano kanoniko P. Alfred Macek. Ni gratulas al niaj sudmoraviaj viglaj pacbatalantoj esperantistaj!

MOST:

Ek de la 31-a de oktobro kursu opor komencantoj – 15 interesuloj. Laŭ Ĉe-metodo instruas Caklová. Sur la Pacplaco propaganda kesteto. Progresintoj kunvenadas ĉiumarde 19-21 h. en Hornický klub.

NÁCHOD:

Ek de la 11-a de oktobro okazas kurso en MEZ-Náchod, kien transiris loka Esp.grupo, kiu kunvenadis en Kultura domo. Krome 27 diligentaj lernantoj laŭ Ĉe-metodo instruas J. Bureš.

OSTRAVA-HULVÁKY:

Kurso ĉe Kleria Konsilantaro ĉiuvendrede en Kultura domo. Gvidas Vladimír Slaný.

PODĚBRADY:

Esperantista rondeto aliĝinta al Distrikta popola biblioteko aranĝis la 18-an de oktobro 1955 sian unuan poresperantan vesperon enhavantan prelegon pri la internacia lingvo kaj unuan Ĉe-metodan lecionon. Nun sekvas kurso por komencantoj gvidata de F. Pytloun /13 lernantoj/ kaj ellernaj laborkunvenoj gvidataj de J. Chvosta. La rondeto kunvenas regule ĉiuĵaŭde /19-21 h./ en la nomita biblioteko. Ne forgesu dum via vizito elserĉi lokajn samideanojn. Grava adreso: F. Pytloun, Jungmannova 29/I. Poděbrady.

POLÁKY /distr. Kadaň/:

Jaroslav Podešva, ano de Esp.rondeto en Přeřov, brigadas nuntempe kiel terkulturisto en vilaĝo Poláky. Fidela al nia movado, li fondis tie Esp.rondeton kun 30 interesuloj, sed mankas al li materialo por instruado /lernolibroj, vortaroj, gazetoj kaj aliaj esperantaĵoj/. Ĉu samideanoj povus subteni lin?

PRAHA:

La tri kursoj ĉe Osvětová beseda ONV2 daŭras vere sukcesplene /instruas E. Řiháčková, A. Slanina, E. Suchardová/. Estas planataj novaj kursoj ĉe OB 2. Porblindula kurso en Deylův ústav komencas en januaro, gvidas V. Novotný.

RÝMAŘOV:

Nova kurso kun 32 lernantoj ek de la 15-a de septembro. En montra fenestro de loka poŝtoŝeĉejo ekspoziciataj informoj kaj dokumentoj pri Esperanto. Loka gazetaro favore informadas pri novaĵoj kaj diligenteco de la loka grupo.

STRAKONICE:

Okazas kurso por komencantoj kun 24 personoj. Aranĝas Domo de Kulturo. Instruas Jan Blažek.

TRENČÍN:

Kunvenoj de esperantistoj kaj Esperanto-amikoj nun ĉiu merkrede je la 18-a h. en Dom osvety, Palackého ulica 23.

Dr-ino MAGDA SEPPOVÁ kaj FERI ŠATURA ek de la 29-a de decembro 1955 **n o v g e e d z o j!**
Al nia konata slovaka samideanino kaj ŝia novedzo ni bondeziras plenan harmonion kaj vivsukceson!

Ĉu la samon ni povos baldaŭ bondeziri al nia kara Maruška kaj ŝia Arvid? Ni tenas ĉiujn fingrojn kaj pensas pri ili dum iliaj klopodoj. La redakcio ne forgesos ĝustatempe informi sian legantaron!

KIO OKAZIS, KION NI AŬDIS, KION NI LEGIS, NI INFORMAS...

LA NICA REVUO, la delonge jam atendata digna heredito de la tradicioj de l' glora Literatura Mondo komencis aperadi. Ĝi estas eldonata unufoje en du monatoj sub la redaktado de profesoro Gaston Waringhien. La unua numero nin agrable surprizis kaj en la lastaj tagoj same la dua. La reveno de Koloman Kalocsay al la aktiva laboro en la Esperanta poezio esprimiĝis per du poemoj, kiuj montras la maturan majstrecon de lia plumo. Amuzas nin Raymond Schwartz per gaja rakontado kaj Reto Rossetti per spritaj infanrimaĵoj por grandaj infanoj, Marjorie Boulton kontribuis per profundsenta poemo pri nenaskota filineto, Waringhien kaj Auld havas traktaĵojn literaturhistoriajn... Nin speciale interesas la eminentaj tradukoj de Jiří Kořínek el Nezval /Adiaŭ kaj tuket' / kaj el Wolker /La mortanto/. Ankaŭ felietono de Ĉapek El la opinioj de l' kato, en la traduko de Miloš Lukáš, nin plezurigis. Sed ni ne povis elĉerpi la tutan enhavon de la unua numero de la nova revue. Ankaŭ la dua numero enhavas montraĵojn de ĉeĥa literaturo: Karel Ĉapek: Kien foriĝas la libro jen la traduko de Miloš Lukáš, kaj Neruda: Kristnaska rakonto, tradukita de nia membro Tomáš Pumpr. Kaj denove: Bedaŭrinde. Al la multaj interesigaĵoj, kiuj demandis pri ebleco aboni regule la revuon, ni devas respondi, ke nuntempe tio ne estas ankoraŭ ebla.

--

REVUO ESPERANTO en sia decembra kajero represas poemon Komenco kaj fino, de Jiří Kořínek, kiu en la fako de originala poezio estis premisa dum la lasta Belliteratura konkurso de UEA. En la sama kajero ni trovas kanton de nia membro prof. Št. Urban: Se mi estus birdo.

--

Karolo P í ĉ:

P O E T O

Mi estas stranga pilgrimant' ;
mistonas mia akra kant' ,
kaj zumas ĝi samkiel knar' ,
kiam mi kantas ĉe ŝtupar'
fremdula.

Kaj kantas mi pri l' viv' kaj mort' ,
pri ŝanĝiĝema homa sort' ,
pri l' ŝip' , maŝino, aŭto, tank' ,
aŭ pri l' printempa neĝoblank'
Betula.

Kaj kantas mi pri l'am' kaj sent' ,
kaj pri l' somera varma vent' ,
sed plu jen sangas mia kor' ...
solula.

/El poemaro „Kartona krono“./

--

RETO ROSSETTI pri ĉs. esperantistoj.

La fama verkisto kaj poeto Reto Rossetti alte aprezas la kvaliton de la ĉs. 7sperantisto jen sia letero, veninta en septembro. Li skribas i. a.:

„La vikleco kaj kuraĝa enterprenemo de la ĉeĥoslovakaj esperantistoj estas fenomeno tre fierinda. Ĉe vi kuŝas granda parto de la mond-elito de nia afero, kaj mi kore speras, ke cirkonstancoj baldaŭ ebligos al vi fari vian plenan kaj tre gravan kontribuon al nia tutmonda pac-movado...“

--

NORDA PRISMO en sia 2-a numero alportis originalan poemon „Tri folioj“ el la verkaro de nia membro prof. Štěpán Urban.

LA PACO, nro 23, kiu aperis dum oktobro en Finnlando enhavas poemeton Lustru kaj ĉifono, de la sama aŭtoro.

Same la 17-a nro de HEROLDO DE ESPERANTO alportas poemeton Matena horloĝo /Edzina grumblo/ de la supre menciita aŭtoro.

Praha-ek-1956-33-06

BULTENO PRAHA 33 - 1956

- 06 -

LIGO DE ĈEĤOSLOVAKAJ INVALIDOJ informas:

En Praha aperas brajle presita porblindula Esperanto-organo „Aŭroro“. Ĝi estas fondita en 1920 kaj estas do unu el la malnovaj Esperanto-gazetoj. Ĝia nerado estis interrompita dum la milito, sed de post 1945 ĝi daŭre kaj regule aperas kaj sukcesis transvivi la periodon de malfavora sinteno kontraŭ Esperanto, kiam ĉiuj ceteraj presitaj Esperanto-gazetoj en Ĉeĥoslovakio ĉesis aperi. Nun aperas la 29-a jarkolekto de „Aŭroro“.

Dum la tempo de sia 35jara ekzisto ĝi akiris pro sia persista kaj konsekvenca porpaca tendenco multajn fidelajn kaj fervorajn amikojn por Esperanto, por la paco kaj por la malfacila laboro de ĉeĥoslovakaj samideanoj. „Aŭroro“ aperadis kvinfoje jare po 150 ekzempleroj, sed ekde 1956, la eldonkomitato decidis pligrandigi ĝian eldonnombron, aperigi ĝin sesfoje jare kaj sendadi ĝin s e n p a g e!! al ĉiuj nevidantaj Esperantitaj alilandaj, kiuj tiucele sendos siajn adresou. Jam nun „Aŭroro“ estas sendata al 27 landoj kaj ricevas de tie multnombrajn leterojn de laŭdo kaj danko pro sia bona lingvo kaj interesa enhavo. La eldonanto de „Aŭroro“ estas la Ĉeĥoslovaka Ligo de Invalidoj. La adreso de „Aŭroro“ estas: „Aŭroro“, Slepcká knihovna, Krakovská 21, Praha 2, Ĉeĥoslovakio.

ESPERANTO-SEMINARIO EN OSTRAVA aranĝita de la loka grupo en Ostrava de la 24-a ĝis 27-a oktobro kun posta Junulara konferenco la 30-an de oktobro, estis bona sukceso. La ministerio koncedis 50% fervojan rabaton kaj tiel kunvenis proksimume 130 personoj. Prelegis sinsekve Janouš, Kočvara, Mohapl, Bendová, Novobilský kaj Echnert. La konferenco montris bonan nivelon de la junulara movado en nia ŝtato.

NOVA BUSTO DE L. L. ZAMENHOF estis kreita de akademia skulptisto Josef Paša en Praha. Temas pri 16 cm alta buleto, ĵus tia, kia taŭgas por ornamo de viaj esperantaj bibliotekoj kaj esperantaj anguletoj en viaj loĝejoj. Multobligita en bakita argilo estas havebla po Kčs 30,- /per poŝto por Kčs 36/.

La mendojn kolektas J. Šustr, Dlouhá 10, Praha I.

HEROLDO DE ESPERANTO EN 1956. Ni esperas, ke ni povos liver la „Heroldon“, danke al grandanimeco de ĝia eldonanto s-ano Teo Jung, ankaŭ en la venonta jaro a/ al ĉeĥoslovakaj aktivaj grupoj, b/ al gravaj laborantoj kaj c/ al seriozaj interesuloj. Krom tio ricevados de ni la revuon d/ la samideanoj, por kiuj estis la abono pagita en eksterlando kaj e/ abonantoj dumvivaj. Tiuj ĉi du lastaj kategorioj /d kaj e/ pagos al ni por 1956 negrandan sumon por kovro de elspezoj, ĉiuj ceteraj po 40 Kčs. Ĉiu ricevos de ni pagilon, sur kiu estos notita la paota sumo. Aliaj interesuloj, precipe nove ekestintaj aktivaj grupoj, postulu tiun pagilon. Antaŭ ricevo de tiu pagilo oni ne sendu al ni monon! – Faimilio Ginz, ekspedanta la „Heroldon“, dankas por la afablaj novjaraj salutoj, venintaj de preskaŭ ĉiuj 135 ĉs. legantoj de „Heroldo“ kaj de multaj aliaj samideanoj kaj plej sincere reciprokas ilin.

EKSPozICIO DE MODELOJ EN AŬSTRALIO distingiĝis per rimarkinda ĉeĥoslovaka partopreno. Pri tio informas per speciala esperantlingva cirkulero s-ano Stan Milligan.

SKRIBU AL RADIOSTACIO HAMBURG laŭ adreso: N.W.D.R., Hamburg esperantlingve, ke vi ŝatus aŭskulti el tiu stacio disaŭdigojn en Esperanto.

ESPERANTO EN LERNEJOJ JUGOSLAVIAJ. Nacia respubliko Slovenio aprobis, ke Esperanto estu instrukta kiel fakultativa objekto en ĝiaj lernejoj ĉiuspecaj. Nacia respubliko Bosnio kaj Hercegovino enkondukis Esperanton en porinstruistaj lernejoj, kiel unu el ses elekteblaj objektoj. En Kroatio oni povas instrui Esperanton en ĉiuj lernejoj kiel „libervola aktiveco“. Sed mankas instruistoj. /Laŭ letero el 4.12.1955 de prof.F. Novljan en Zagreb/.

CANKO MURGIN EN ĈEĤOSLOVAKIO. Tiu ĉi bulgara samideano, asistento de geografio ĉe la Ekonomia Instituto de Karlo Marks en Sofia, alvenis al Praha la 4-an de novembro /el Plzeň/ kaj restis en nia urbo ĝis ĵaŭdo la 10-an de novembro. Dum sia restado en Praha vidis nia bulgara amiko la ĉefurbon kun siaj memorindaĵoj kaj li vizitis ankaŭ, akompanita de ni, multajn gravajn instituciojn: la ministeriojn de instruado kaj de kulturo, Ĉeĥoslovakajn sicencan akademiojn, Altan ekonomian lernejon kaj rilatis kun pluraj eminentaj ĉeĥoslovakaj fakuloj. Ĉie li menciis la rolon de Esperanto, kiu ebligis lian vojaĝon tra nia tuta ŝtato kaj li faris tiel multe da utila propagando por nia afero. Li ĉeestis ankaŭ ĉiujn Esperanto-kunvenojn, okazintajn dum lia restado en Praha kaj raportis tie interese pri la E-movado bulgara kaj pri celoj de sia vojaĝo. La simaptia samideano, kiun ni jam antaŭe, la 31-an de oktobro nokte bonvenigis en Praha dum lia traveturo al Plzeň, daŭrigis sian vojaĝon al Pardubice. Raporto el tiu loko, same kiel raportoj el ĉiuj ceteraj lokoj de nia respubliko diras, ke ĉie s-ano Murgin sukcese laboris kaj grave helpis al ni en niaj klopodoj.

--

DENOVE KALOCSAY! Kalocsay, silenta dum 8 jaroj, revenas al la esperanta parnaso per la verko: Ezopa saĝo. Sepdeksep fabloj verse reverkitaj. Eldonas ĝin Komuna Konversacia Klubo, Randbølvej 4 København printempe 1956, se antaŭpagos ĝin por favorprezo \$ 1,15 minimume 250 aĉetantoj. KKK eldonis brile la „Rozojn kaj Urtikojn“ de Poul Thorsen. Ni povas do fidi, ke la nova Kalocsay-libro estos nova juklo por via Esperanto-biblioteko. Serĉu mem manieron, kiel ĝin antaŭpagi. Ni mem donas neniajn konsilojn.

--

DIA KOMEDIO kompleta en Esperanto-traduko de J. Peterlonge, kun 64 ilustraĵoj de Sandro Boticelli, aperos en Italio. Aldonita estos paralela itala teksto kaj riĉa komentario. La verko aperos verŝajne en la jaro 1957.

--

HUNGARA RADIO. Ni petas ĉiujn niajn aktivulojn, ke ili skribu tuj al „Hungara Radio, Budapeŝt“. Ili petu de la stacio reulajn Esperanto-disaŭdigojn de informoj pri tiu lando. JUNULARA ESPERANTO-VIVO EN HUNGARIO. Jam ekzistas kelkaj junularaj esperantaj rondoj en nia lando. Ek de 18.9.1955 funkcias Hungarlanda Esperantista Konsulta Komitato, kaj en ĝi s-ano Imre Ferenczy, kiel junulara referento. La „Paco“ Esp. rondo Budapeŝt havas jam junularan gvidanton: s-ano Lajos Csonka. –En Esztesgom-Tábor gvidas kurson por 15 gelernantoj s-ano Ando Laczkó. Ili ricevas helpon de sindikata organizo kaj de kulturhejmo. La 20-an de novembro ministaj esperantistoj en Tokodaltaro aranĝis ekspozicion kaj kunvenon. Ĉeestis s-ano Julio Baghy, prezidanto de Hungara TKKE, Márton Lajos, sekretario, Imre Ferenczy, junulara referento, kiuj parolis pri Hungarlanda movado. La plimulto de la partoprenintoj estis ĉefe junuloj el Tokodaltáro kaj Esztergom-Tábor. –En teksta fabriko „Goldberger“ fondiĝis Esperanto-junulara rondo, kie ĉirkaŭ 25 gejunuloj interesiĝas pri nia lingvo. –En gimnazio de Vasvár funkcias Esp.junulara vivo, gvidata de prof. József Kondor. – Mi esperas, ke nia movado disvastiĝos bone kaj venontfoje mi povos informi baldaŭ pri pluraj sukcesoj kaj rezultoj. Imre Ferenczy, Junulara referento de Hungarlanda TKKE Budapeŝt IX., Ullői ut. 119.

--

ESPERANTO EN VIETNAMO ekvivis denove kaj ĝojinde progresas. Ni ricevis pri tio daŭre ripetatajn pruvojn kaj ni esperas, ke ni povos baldaŭ raporti pri rezultoj de nia kunlaboro.

--

Praha-ek-1956-33-08

BULTENO PRAHA 33 - 1956

- 08 -

VIETNAMA FERVOJA UZINO volas korespondi per Esperanto kun samspeca entrepreno ĉeĥoslovaka. Se estas en via loko tia uzino, instigu ĝin, ke ĝi skribu al adreso, kiun postulu de la Esperantista Klubo en Praha.

GIMNAZIO NGUYEN-TRAI EN HANOI deziras korespondi kolektive kun ĉeĥoslovaka meza lernejo.

Adreson-sole por tiu ĉi celoj – petu de la Esperantista klubo en Praha.

KARBMINIJO EN VIETNAM volas ekligi Platon kun ĉeĥoslovakaj karboministoj. Instigu minejon, en kiu vi laboras, ke ĝi skribu pri sia vivo kaj laboro al adreso, kiun postulu kiel pli supre. La vietnamaj ministr atendas seriozajn leterojn!

- -

REVIZORO EN ESPERANTO. En la itala urbo Bologna okazis internacia kongreso, en kiu nenio partoprenanto bezonis tradukanton. Estis la 40-a kongreso de esperantistoj. Proksimume 2000 delegitoj el ĉiuj partoj de la mondo kunvenis por prijuĝi la eblecon enkonduki Esperanton en lernejojn konforme al la propono, prezentita antaŭ nelonge per UNESKO. Kun la laboro de la kongreso estis kunigita interesa okazintaĵo en la teatra vivo de Bologna. La unuan fojon sur la sceno de la urba teatro estis prezentita por la partoprenantoj de la kongreso „Revizoro“ de Gogol en Esperanto. – Tion ĉi ni lega sen la impona kvina numero de la revue „INOSTRANNAJA LITERATURA“, pĝ 276, aperanta en Moskva. Kun plezuro ni konvinkiĝas, ke Esperanto nepre ne estas tabuo en soveta gazetaro. Post multjara silento ĝi signifas simpton kuraĝigan.

- -

NOVOJE VREMJA pri Esperanto. Tiu ĉi gazeto, kiu aperas samtempe en 10 diversalingvaj eldonoj, citas en sia 46-a nro, pĝ 25 favore Esperanton en artikolo de angla parlamentaĥ Hughes.

-

ESPEANTO EN ĈEĤA GAZETARO. Kun ĝojo ni konstatas, ke ne plu sufiĉus spaco en nia Bulteno, se ni volus laŭ nia lastatempa kutimo saluti per artikolego ĉiun okazon, kiam ĉeĥoslovaka gazeto medias Esperanton en siaj kolonoj. Nombro de tiuj artikoloj multiĝas, kaj ni aldonu, ke ĉiuj estas favoraj. Ni citas nun: Práca, Bratislava 7-an de decembro „Predaná nvesta v esperante“ kaj denove 14-an de dec. „Esperanto a Predaná neveta“ pri la novaj gramofodiskoj kun E-arioj kaj duetoj el „Vendita fianĉino“ de B. Smetana. Kaj pri la sama temo Mladá Fronta, Praha kaj Slobodné slovo. Pri Revizoro en Esperanto skribas Svobodné noviny, Praha la 18-an de dec kaj Lidová demokracie, kiu ankaŭ 27-an de novembro informas, ke Kalocsay finis sian esperantlingvan tradukon de Baudelaire kaj ke tiu poeto tradukas ankaŭ Heine en Esperanton. Estas tre verŝajne, ke ankaŭ aliaj gazetoj atentis nian aferon kaj ni bezonas scii pri tio. Ne sole por registro, sed iam por diversmaniera utiligo aŭ interveno sendu al ni rapide ĉiun gazeton, kie vi trovas artikolon, kiu koncernas lingvon internacian

-

REVUO DE ĈEĤAJ BIBLIOFILOJ „Zprávy Spolku českých bibliofilů v Praze raportas en sia 5-a nro de la 7-a de novembro en duonpaĝa artikolo pri la subteno, kiun dum 30 jaroj donas nia membro Ota Ginz al la Andersen-muzeo en Odense. Estas tie citata la invita letero, kiun li ricevis al la Andersen-festoj kun noto, ke la letero estis skribita en Esperanto.

-

ESPERANTO HELPAS. Eminentaj esperantistoj en Praha danĝere malsaniĝis. Kuracistoj en hospitalo deklaris, ke povus lin helpi kuraciolo fabrikanta en Hungario, sed nun neniel havebla en nia lando. Amiko Balkányi en Budapeŝto prizorgis tuj la kuracilon, kvankam mankis la necesa kuracista atesto, prizorgis ankaŭ la eksportpermeson kaj ekspedis la 20 injekciojn eksprese al Praha la saman tagon, kiam li ricevis nian peton. Li tiel eble savis valoran homan vivon. Li kaj Esperanto, kiu ĉion ebligis, meritas eternan dankon!

Laŭbezone eldonas Esperantista Klubo ĉe Osvětová Beseda en Praha 2.

Koresponda adreso: Jaroslav Š u s t r, Dlouhá tř. 10, Praha I.

Respondekas pri la enhavo: Josef Vítěk, Jungmannova 24/I. Praha 2.